# Vertikale

Trimonata
periodaĵo
por la aktivuloj
de FEL

januari-februari 1994



**Flandra Esperanto-Ligo**
## Estraro
*Prezidanto:* Alex Humet
*Membroj:*
Roland Rotsaert
Paul Peeraerts
Jos Vandebergh
Pieter Vets

## Komisiitoj:
*Financoj:*
Roland Rotsaert
Paul Peeraerts
Gerd Jacques
*Eldona agado:*
William Auld
Gerrit Berveling
Chris Declerck
Rejna de Jong
Alex Humet
Paul Peeraerts
*Instruado:* Raymond Wylleman
*Informado:* Edward Symoens
*Dokumentado:* Marc Vanden Bempt
*Rebata servo:* Germain Pirlot

## Oficejo
La oficejo de FEL troviĝas en Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen. Ĝi estas malferma por la publiko ĉiun labortagon inter la 9a kaj 12a30 kaj inter la 13a30 kaj 17a30. Vizitantoj bonvolu tamen anticipe interkonsenti pri rendevuo.
Telefono (9-12.30 -- 13.30-17.30h) (03) 234 34 00 - telekopiilo (tagnokte): (03) 233 54 33.

La adresoj de la supraj personoj estas troveblaj en la adresaro malantaŭe en Vertikale. Tie vi ankaŭ trovos la adresojn al kiuj referencas la asteriskoj post kelkies nomo en artikoloj.

# Enkonduko (jdm)
Kiel vi ankaŭ ĉi-numere povas konstati daŭre kriple funkcias la informfluo ene de FEL. Denove nur el malmultaj anguloj novaĵo venis. La rubrikoj instruado, varbado kaj okazis restis malplenaj. Konsciu bone ke tute ne necese temu pri mondtremiga informo. Same ne nur sciigu bonajn aferojn, male, el eraroj ni devas lerni.
Interesas lokajn grupojn scii kion faras la aliaj, kiel ili organizas kurson, kian sukceson ĝi havas, ktp. Entute ne ekzistas kialo por esti retenema. Eĉ bagatelaj aferoj povas mallonge esti menciitaj en Vertikale.7

Pere de tiu ĉi revuo pliboniĝu la kontakto inter unuopaj aktivaj esperantistoj. Vi trovas multajn utilajn adresojn en la fino de ĉiu numero. La organigramo estos baldaŭ novfarita kun la nomoj kaj adresoj de novaj estraranoj.
Ĉi tiu numero aperas iom pli frue, por la sekva vi havas tempon sendi kontribuojn ĝis **vendredo la 24a de junio**. Do, karaj, ek al verkad'!

# Uzado
## Okazas
**Jubilea konkurso de Pola Radio**
Okaze de la 35-jariĝo de la Esperanto-elsendoj de Pola Radio, kiu pasos la 4an de aprilo 1994, la Esperanto-Redakcio organizas ĉi-okazan konkurson. Ni invitas al partopreno ĉiujn niajn aŭskultantojn, legantojn de E-gazetoj, membrojn de E-kluboj en diversaj landoj. Tial ni esperas, ke la konkursajn demandojn oni vaste diskonigos same pere de E-amaskomunikiloj, kiel ankaŭ en E-kluboj. Tute aparte ni petas la redaktorojn de E-gazetoj publikigi la nunan informon pri la konkurso. Ni kompostis ĝin tiamaniere, ke la redaktoroj de E-informiloj povu simple transpresi la tekston en preta formo, sen la neceso retajpi aŭ rekomposti ĝin.
Por partopreni la konkurson oni devas respondi al almenaŭ unu el la jenaj demandoj:

1. Kio instigas vin aŭskulti la E-elsendojn de Pola Radio kaj kian signifon ili havas por vi?
2. Kion vi opinias pri la rolo kaj signifo de la E-elsendoj de Varsovio en la tempo de grandaj politikaj kaj ekonomiaj ŝanĝoj en Eŭropo kaj strebado al partnereca-paca kunlaboro sur nia kontinento?
3. Kiagrade la E-elsendoj de Pola Radio, fone de viaj nacilingvaj amaskomunikiloj, proksimigas al vi la bildon de Pollando?

Ni ĝojus, se vi persone, viaj leter-amikoj, viaj samklubanoj, ktp. *respondus al almenaŭ unu el la menciitaj demandoj*! La amplekson de viaj respondoj ni lasas al via propra decido.
**La konkursaĵojn oni sendu ĝis la 30-a de junio 1994 al la kutima adreso de Pola Radio (*).**



Inter la aŭtoroj de plej interesaj konkursaĵoj ni lotumos unu specialan premion en la formo de fasko da magnetofonaj kasedoj kun kopioj de elektitaj intervjuoj kaj literaturaĵoj el la arkivo de nia E-Redakcio, krome ni lotumos E-librojn, popolartaĵojn, muzikkasetojn kun E-kantoj, ktp. Se iuj E-eldonejoj deziros subteni nian konkurson kaj pretus fariĝi sponsoroj per senpaga disponigo de E-libroj, kanto-kasedoj ktp. por plivastigi la kvanton da disponeblaj premioj - ni volonte kaj ĝoje akceptos tion kaj informos en niaj E-elsendoj pri la nomoj de la firmaoj, eldonejoj, donacintaj la kromajn premiojn.
Pola Radio, Esperanto-Redakcio

## Okazos
**Tago de la flandraj Ardenoj - 24 maj 94**
*La verda tago*
La naturasocio "Wielewaal" kaj la loka fondaĵo "Omer Wattez" kune organizas jam multajn jarojn la "Tagon". Tiamaniere ili volas konatigi plejeble multe da homoj kun "siaj" Flandraj Ardenoj. Diversaj en- kaj eksterlandaj grupoj venas tiam ĝui la plej belajn lokojn de la regiono. Lokaj gvidantoj kondukas ilin tra la brilaj pejzaĝoj kaj kune estas vizitataj interesaj naturrezervejoj, alie ne alireblaj. **Nia grupo estos la sola ne-nederlandlingva.**
*Praktike*
Estos 2 promenoj: de 9a ĝis 11a30 kaj de 13a30 ĝis 17a. Krom la lokaj gvidantoj akompanos nin 2 esperantistoj-naturgvidantoj. Kunportu fortikajn ŝuojn aŭ botojn. Kotizon ni fiksis al 100 BEF, eblan profiton ni donacos al la "Naturfonduso Flandraj Ardenoj". Pli da detaloj: post aliĝo ĉe Piet Glorieux (*).

**Grava aŭkcio - 7 maj 1994, 19a horo**
Liĝe al la tradicia serĉpromenado la genta grupo La Progreso organizas aŭkcion de multaj brokantaj E-libroj, i.a. diversaj raraĵoj, malnovaj E-revuoj, kelkaj E-diskoj kaj pluraj aliaj esperantaĵoj. Estas unika ebleco por komencantoj, progresantoj kaj kolektantoj. Libroj estas vendotaj ekde 10 frankoj, neniaj kostoj aldoniĝos! La vendado estas profita al la speciala kaso por la interŝanĝa projekto Gent-Tallinn. Pliajn informojn donas Patrick Haerick (09/227.02.15).

**Serĉpromenado tra Gent - 7 maj 94**
La Progreso iam ekorganizis siajn promenadojn por la lernantoj, kiel amuzan finon de la vesperkurso. Ĉi-foje la lernantoj de la dua jaro mem verkas la demandojn kaj ili elektis la nordorientan parton de Gent, la antaŭan komunumon Sint- Amandsberg kiel promenejon. Tie ni vizitos la plej junan el la tri gentaj beginejoj, la "Grandan Beginejon" kaj ankaŭ la faman tombejon "Campo Santo"-n kie multaj konataj flandroj estas enterigitaj.
Praktike: Tiun sabaton ni kolektiĝos inter la 14a kaj la 14a30. Panmanĝo je la 18a (bv. anonciĝi) kaj je la 19a aŭkcio. Interesiĝantoj povas ankaŭ viziti la E-straton. Informoj ĉe Katja Lödör (09/230.16.77 aŭ 09/221.10.02).

**Antverpeno '94: Mercator-jaro**
Denove deko da bonaj, sindediĉaj, spertaj antverpenaj esperantistoj ofertas altnivelan programon dum Pentekosto 1994, t.e. de la 20a ĝis la 23a de majo. Kun jam unujara sperto esperatas same granda sukceso ol pasintan jaron. Pliajn informojn ne hezitu peti de FEL.


**Trilanda Renkontiĝo - 24 apr 94**
Okazos ĉi-jare en Akeno (Germanio) de la 9a horo ĝis la 18a en la junulargastejo Colynshof, Marie-Thérèse Allee 260, Aachen.
Ingrediencoj de la programo: tagmanĝo (menuo) kaj kafo matene kaj posttagmeze. Tranoktebleco kun matenmanĝo: treege malaltaj kostoj. Jam anoncu vin ĉe s-ro Wolfgang Bienen (*).

**Liftoj por ŝipoj - 26 jun 94 (APE)**
Asocio por Esperanto organizas esperantan tagon kun itala tagmanĝo, prelego kaj ekskurso sur kanalo kun vizito al ŝipliftoj.
Prezo por la tuta programo + tagmanĝo: 1000 BEF. Pagu al APE-konto 001-0840710-87, Marcel Delforge (*), tel. 071/43 14 13.

## Informado

**Belga Eo Fervojista Asocio (Lucien De Sutter (*), prezidanto)**
BEFA ĉiun merkredon inter la 14a kaj la 16a prizorgas E-informejon en Putterij n-ro 25, en la salonoj por la fervojistaj libertempaj asocioj en Bruselo.
Putterie/putterij estas unu el la tri stratoj kiuj ĉirkaŭas la triangulan konstruaĵon de la centra stacidomo. Nia stando troviĝas vidalvide de la centra oficejo de Sabena. Estas do bonega loko, meze en la ĉefurbo, facile atingebla.
En nia informejo vi havas eblecon pruntepreni E-librojn, aŭskulti E-diskojn kaj -kasedojn, ktp. BEFA intencas ankoraŭ plibonigi tiun unikan servon por fervojistoj kaj ne-fervojistoj.
Dum la vintra sezono, t.e. de oktobro ĝis aprilo, okazas tie E-kursoj sabate de la 10a ĝis la 12a horo, je 2 aŭ 3 niveloj.
Posttagmeze inter la 13a kaj la 17a estas organizitaj E-prelegoj, -konferencoj, -forumoj, ktp.

**Kion fari por vigligi kluban vivon? (gp)**
*Konstato*
Krom kelkaj esceptoj, E-klubo estas strukturita kiel izolita ĉelo, kvazaŭ kiel geto, kun preskaŭ neniuj rilatoj kun la ĉirkaŭaĵo. Temas pri **centripeta strukturo** kiu estas la kutima organizo de loka E-klubo, t.e. ĉelo, kiu strebas enirigi ĉiujn membrojn en saman medion kun komunaj aktivaĵoj.
*Centripeta strukturo:*





izolitaj anoj

Sekve novbakita esperantisto havas nur du eblojn:

- konsenti pri tiu rigida formulo kaj eniri
- forlasi kaj la klubon, kaj tre ofte ankaŭ la E-movadon

*Solvo!?*
Pli kaj pli ni klopodu starigi **centrifugan strukturon** kiu, kiel polpo, strebas eniri en la plej diversajn mediojn kaj kies membroj mem proponas kaj prizorgas aktivecojn. Sufiĉas du, tri homoj por roli kiel faka E-grupo kiu laŭeble kunlaboru kun loke samfaka grupo neesperantista. Laŭ tia strukturo eblas pli facile kaj pli efike integriĝi en la lokan/regionan socion.
*Centrifuga strukturo:*




loka E-fakgrupeto, nur parto de siaj membroj estas anoj de la loka E-grupo

neesperantista fakasocio, nur parto de sia membraro estas anoj de E-fakgrupo

*Funkciado*

- ĉefcelo estu aplikado de Eo laŭ propraj interesoj
- tiu agado komenciĝu post elementa (unujara) lernado de Eo por havi bazan gramatikon
- ĉiu agado okazu nur en Eo por pliriĉigi la vorttrezoron kaj plifirmigi la gramatikon
- la klubanoj ariĝu laŭ propraj interesoj: filatelio, birdoj, poezio, paco, matematiko, ktp.
- ĉiu grupeto:
  - arigas dokumentojn (librojn, artikolojn, bultenojn) laŭ la elektita temo
  - klopodas havi kontaktojn kun loka asocio ku havas la samajn interesojn
  - informas ĝin pri faka agado en Eo (konferenco, semonario)
  - tradukas tekstojn el Eo por proponi ilin al nacilingva bulteno
  - tradukas artikolojn el nacia lingvo en Eon por proponi ilin al E-gazeto
- monate (ekz.) la grupetoj havas komunan kunvenon en la klubejo por prepari tekstojn, peti informojn, konsilojn de la instruanto (aŭ de E-spertulo) rim.: intertempe ĉiu gripo laboras sendepende
- regule estu aparta kunveno en la klubejo por diskonigi al aliaj laborgrupoj la faritan laboron, interŝanĝi spertojn, ktp.
- laŭeble ĉiu grupo mallonge sed regule raportu pri sia agado en E-bulteno
- nepre tiuj grupoj klopodu havi kontaktojn kun samfakuloj el aliaj urboj kaj landoj

*Konkludo*
Pripensu tiun sugeston kaj spertu ĝin antaŭ ol malaprobi ĝin!!!



**Literatura foiro: jubileo**
Literatura Foiro estas dumonata kultura revuo en Esperanto. En 1994 ĝi kompletigas sian 25an jarkolekton. Eldonata en Svisio, rekomendinda! Abonprezo: 1000 BEF. Peranto: Mari-Roza De Wolf (*) p.ĉ. 000-1528539-13. El informilo de La Konko).

**Eŭropa kunagado (gp)**
*Al silento respondas silento.* **NI MALSILENTU!**
Tre baldaŭ okazos eŭropa balotado (junie de '94). **Nepre ni kaptu** tiun okazon por **senprokraste** atentigi pri lingvaj problemoj en Eŭropo

- eŭroparlamentajn
- ĵurnalistojn
- politikistojn
- eŭropajn asociojn

Ni bone **konsciu** ke tiuj homoj plej ofte estas malbone aŭ mise informitaj pri Eo. Sekve ni *singarde, diplomate* kaj *ŝtupare*

- atentigu pri la lingva problemo kiu igas diskriminacion inter eŭropaj civitanoj (ekz. Eŭropa Armeo, Eŭropa Markoficejo, k.s.)
- sugestu uzadon de neŭtrala, supernacia lingvo (Eo)
- klarigu ke per Eo iĝu pli facile vera kaj bunta plurlingvismo; neniel Eo estu fincelo, ĝi estu taŭga ilo
- rebatu laŭbezone per trafaj, realismaj ekzemploj
- informu objektive

**Neniam** ni polemiku. La ĉefcelo estas dialogi por atentigi pri Eo. Akra rebato havigas nur novajn kontraŭulojn!
**Endas:**

- kunagadi amase kaj translime
- interŝanĝi spertojn, argumentojn, rezultojn

Bv. diskonigi tra Eŭropo. Antaŭan dankon!

**Partio por Eo en lernejojn - 22 dec 93**
La pacisma-socialista partio en Nederlando, (re)fondita 3 okt '92, intencas partopreni la parlamentajn elektojn de la Dua Ĉambro la 3-an de majo 1994. Je 18 dec 1993 la ĝenerala membrokunveno decidis akcepti la sekvan eron por la elektoprogramo pri instruado 1994-1998:
*Eo devus esti akceptita kiel dua lingvo en la ĝenerala edukprogramo ekde la sejara aĝo.*
La voĉdona rezulto pri ĉi punkto estis 8 por 7 kontraŭ kaj 3 sindetenoj.
La partio same intencas stimuli la etnajn lingvojn en Nederlando kaj volas plibonigi la pozicion de la frisa lingvo:
*La instruado en la frisa lingvo estas okazenda frislingve, se tiu dua ŝtata lingvo koserviĝu.*
Inge van de Stadt (*), nome de PSP'92.
*Noto:* En ŝia letero, kiu plue enhavas tutan argumentadon, troviĝas multaj eraroj (remedoj, posicio, akuzativaj misoj) sed ankaŭ la nederlanda teksto (dorsflanke) montris stilajn kaj lingvajn mankojn. (jdm)

**Korekto**
En la estrara protokolo de 17 dec 93 estis menciita erara prezo de la Nuda Feino. Anstataŭ 690 ĝi kostas nur 450 BEF. (Bona argumento aĉeti ĝin tuj!)

## Varbi anoncon

por Horizontaal aŭ Monato kaj La Jaro povas fari ankaŭ vi! Plej da sukceso vi probable havos ĉe viaj konatoj (niaj elĉerpiĝis pli malpli). Por M kaj LJ aliru internaciajn firmaojn. Eblos profitigi vian klubon per makleraĵo por ĉiu varbita anonco! Aldone vi trovas la donitaĵojn necesajn, por efika agado petu stokecon da A4-aj informiloj de la centro.

HORIZONTAAL - Identiteitskaart

**Hoofdredacteur:** Guido Van Damme
**Medewerkers:** Paul Peeraerts, Ivo Durwael, Alex Humet, Jean-Pierre VandenDaele, e.a.
**V.U.:** Paul Peeraerts
**Redactieadres:** Vlaamse Esperantobond
Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen
Tel.: (03) 234.34.00 Telefaks: (03) 233.54.33

**Grafische vormgeving:** Hugo Fontyn
**Zetwerk, foto's, montage en druk:** Grafisch Centrum van de Vlaamse Esperantobond te Antwerpen

**Technische gegevens:**
pagina lay-out: 165 x 270 mm, opmaak in twee kolommen van 80 mm (formaat Din A4)
lettertype: helvetica halfvet – gewoon – fijn
10 punt met 4,25 mm witgeving
8 punt met 3,5 mm witgeving
papier: wit 80 gr. kringloop

**Oplage:**
5000 exemplaren met een verspreidingsgebied over heel Vlaanderen en een gedeelte in Nederland; als volgt over diverse beroepsklassen verdeeld: 32 % onderwijswereld (leerkrachten 17 %, studenten 15 %); 30 % bedienden en middenkader; 18 % zelfstandigen en vrije beroepen; 19 % buiten het arbeidscircuit.

**Advertentie-tarieven:**

| | 1-malig | 3-malig | 6-malig |
|---|---|---|---|
| formaat 1/1: | 9 000 | 24 000 | 45 000 |
| formaat 1/2: | 5 500 | 14 500 | 27 500 |
| formaat 1/3: | 3 500 | 9 000 | 16 000 |

Op deze tarieven geldt het bijkomend BTW-tarief van 20,5 %.
Kleurtoeslag bedraagt 3000 fr. per kleur en per inlassing.

# Monato

## internacia magazino sendependa

**eldonita de Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio**

**Anonc-tarifo n-ro 7 (valida ekde la 1a de aprilo 1994)**

**Legantoj:** 10 000 en 80 landoj
**Formato:** 284 mm alta, 204 mm larĝa
**Komposta areo:** 255 alta, 178 mm larĝa, 3 kolumnoj de 56 mm
**Presado:** ofseto foliara — uzeblaj estas nur reprodukt-pretaj fotoj, desegnaĵoj kaj negativaj filmoj
**Kompostado:** 9/11 p Helvetica
**Limdato por anoncoj:** 2 semajnoj antaŭ aperdato (1a de ĉiu monato — 12 kajeroj jare)

**Prezo de nigra-blankaj anoncoj:**

| grandeco | | mezuroj mm alta | larĝa | prezo |
|---|---|---|---|---|
| 1/1 | | 251 | 172 | 12 000 BEF |
| 3/4 | trikolumna | 188 | 172 | 9 450 |
| 2/3 | dukolumna | 251 | 112 | 8 500 |
| 1/2 | dukolumna | 188 | 112 | 6 500 |
| | trikolumna | 124 | 172 | |
| 1/3 | unukolumna | 251 | 54 | 4 500 |
| | dukolumna | 124 | 112 | |
| 1/4 | unukolumna | 188 | 54 | 3 450 |
| | trikolumna | 59 | 172 | |
| 1/6 | unukolumna | 124 | 54 | 2 400 |
| | dukolumna | 59 | 112 | |
| 1/12 | unukolumna | 59 | 54 | 1 500 |

**Aliaj formatoj:** 60 BEF $cm^2$
**Koloroj:** Por aldono de koloro, pluspago de po 3 600 BEF. Por kvarkoloraj fotoj, pluspago de 38 000 BEF + filmkostoj.
**Anoncetoj:** 56 mm larĝa, 1 linio 40 BEF (minimuma faktursumo: 500,– BEF; ne eblas uzi fotojn, desegnaĵojn, emblemojn, kolorojn)
**Suplementoj:** Por aliaj paĝoj ol paĝo 2: 10% pluspago (rabatebla). Aperigo en parto de la eldonkvanto ne eblas; pri apartaj reklamfolioj por kunsendado aŭ envinktado kontaktu la eldonejon.
**Rabatoj:** Ĉe ripeto de la sama anonco dum du sinsekvaj numeroj 5 %, ĉe 3 ĝis 5-foja aperado dum sama jaro 10 %, ĉe pli ol 5-foja aperado dum sama jaro 20 %.
**Pagkondiĉoj:** 30 tagoj post fakturado por eŭropaj klientoj, 60 por ekster-eŭropaj klientoj; 2 % redukto ĉe antaŭpago. Por loĝantoj el la Eŭropa Komunumo aldoniĝos la Aldonvalora Imposto (AVI) de 20,5 %.

## Interne

Fleja-estrarkunsido - 4 feb 94 (sc)
Ĉeestas: Stefaan Cottenier (protokolas), Jorg De Mulder, Wim Slootmans

0. Pro daŭra malsano de Yves, liaj sekretariaj kaj porsemajnfinaj taskoj estu provizore transprenitaj. Stefaan protokolos, Jorg rigardos la poŝton kiu Frankrijklei-e alvenas en la poŝtkesto de Fleja. La sendadon de informoj al JEN kaj Eventoj Yves okazigis. Okaze ke li sendis al JEN nur la flugfolion, Stefaan sendos pli celtrafan tekston.

1. Jorg koncize revenas al MEJK. Du ĉefkonkludoj: unue ke ni finance kaj membrokvante tre bonfartas kompare al multaj aliaj TEJO-sekcioj. Tamen nia agado ne estas samproporcie pli bona. Alivorte, ni ne bone eluzas niajn financajn kaj homajn rimedojn. Due, alilande oni ofte abunde suĉas subvenciojn por partopreni kaj/aŭ aranĝi kunvenojn. Ĉe ni tiuj eblecoj ne oftas, kaj ni iel sukcesas ĉiam perdi la sperton akiri ilin
ĉe transiro al alia estraro.

2. Por helpi al la problemo pri homfortoj: ne malofte okazas ke iu konas personon kiun eblas interesi pri Eo. Por povi doni al tiuj kandidatoj konkretan inviton, Stefaan verkos "membrigan leteron". Ĝi daŭre disponeblu kaj ni sendu ĝin personigite al la koncernaj homoj. La sama letero kun alia enkonduka paragrafo taŭgos por provi rekapti (eks)membrojn kiuj forgesis pagi sian kotizon. Poste (iom malpli urĝe) estos verkata "aktiviga letero" por instigi jamajn membrojn al aktiva agado. Same verkiĝos letero por proponi abonon al Koncize.
Por helpi al la problemo pri subvencioj: Wim kontaktos André Ruysschaert kaj Gerd Jacques por provi reekhavi la perdiĝintajn sciojn.

3. Venis peto el Nederlando ĉu eblas kune kun ili presi pliajn ekzemplerojn de la nederlandlingva informfolio pri Eo de TEJO (komuna mendo malaltigas la preskostojn). La folio celas unuan konatiĝon kun Eo, kaj tiel kompletigas nian propran broŝuron kiu celas jam-iom-interesitojn. NEJ volas presigi 2500 da, ni faros same. Wim informiĝos pri la kostoj en GCA kaj informos la petintojn.

4. Ni povas disponi pri la subtegmenton de la E-domo (kiu nun estas ĉefe rubejo) por aranĝi ĝin kiel daŭran kunvenejon kaj distriĝejon. Jorg kaj Wim enordigos ĝin laŭeble je la 13-a de februaro. Ili petos helpon de Ivo Durwael kaj Els De Vleesschouwer.

5. Jorg sugestas varbi pli da patronaj membroj. Stefaan verkos anoncon por meti en Vertikale-n.

6. El Nederlando venis ankaŭ peto ĉu eblas ke FLEJA kaj NEJ en Flandrio organizu (IS-preparan) kurson por ŝtopi la grandan truon inter la ĉiujaraj paskaj kursoj en Nederlando. La punkto estas transigita al alia kunsido.

7. OKEJ okazos aprile en Antverpeno. Por inviti la partoprenantojn, Wim skribos invitleteron. Tiucele li trafegos la protokolon de la pasinta MEJK kaj ties invitleteron por havi ideon pri la enhavo kaj celo de tia kunveno.
Rilate la tranoktadon: La subtegmento povas oferti tranoktadon kelkpersonan por neduŝemuloj. Por la aliaj trovendas lokoj ĉe Antverpenanoj, kio laŭ Jorg ne kaŭzos problemojn. Li esploros.

8. En Tessenderlo okazos Alternativa Feriborso. Laŭ la informoj en ĝia petletero pri sendado de materialo au budo, ni konkludas ke ĝi estas LA taŭga loko por informi pri Eo. Certe indas sendi informojn: nia broŝuro, la listo de PS, jarlibro, fotoj au diapozitivoj pri kongresoj, ktp. Ne tuj klaras ĉu haveblas homfortoj por mem esti prezenta tie (vidu punkton 2), kaj ankau nebulas kiu esploros ĉi-rilate. Sendi materialon certe ja eblas.

9. Stefaan proponas provizoran programon por la semajnfino. Jorg aldonas vesperan kantadon fare de ... (?).

10. La Venonta kunsido okazos je dimanĉo la 27a, 20h ĉe Eddy. Tiun posttagmezon kunvenos tie Wim, Jorg kaj Ilja De Coster por leciono pri la Fleja-financoj far Eddy.

> ### Adaptoj organigramo
> **La Konkordo**
> Forpasis la prezidanto, Jan Hanssens, kaj nova estraro elektiĝis. Prezidanto: Jean-Pierre Allewaert; sekretario: Piet Glorieux (*); kasisto: Danielle Demeyere (*). Piet Glorieux fariĝis krome administranto.
> **Fleja**
> La telefonnumero de la kasisto, Eddy Van den Bosch, estas 03/744.00.48. La sekretario Yves Nevelsteen loĝas en Violetlaan 7. Provizore daŭre estas komitatano Pieter Vets kaj ne Stefaan Cottenier (antaŭe estis kaj Stefaan kaj Pieter, sed membraro falis sub 100, do ni rajtas je nur unu reprezentanto).
> **La Verda Stelo**
> Nova estraro. Prezidanto: Jacques Schram (*); vicprezidanto: Henny De Ketelaere (*); sekretario: Lydia Kerremans (*); kasisto: Clara Claes (*); konsilanto: Ivo Durwael (*).
> **La Pioniro**
> Hilde Wauters rezignas pri sia mandato de reprezentanto de la alsta grupo en FEL. Anstataŭos ŝin Mari-Roza De Wolf, la prezidanto de La Pioniro.
> **La Erikejo**
> Estrarelekta rezulto: transprenis vicprezidantecon Wim De Smet (*).

Estrarkunsido de FEL - jan 94 (pp)
Ĉeestas: Roland Rotsaert, Paul Peeraerts kaj partatempe Alex Humet.
Jean Pierre Allewaert kaj Jorg De Mulder pro troa okupiteco forlasis la estraron. Pieter Vets petis senkulpigon.
Protokolas: Paul Peeraerts.

0. Ĵus forpasis pastro Beckers, plurjaradeka limburga aktivulo. La enterigo okazas nun dum la estrarkunsido. La estraranoj enpense estas ĉe li kaj kondolencas la limburgajn grupojn pro tiu forpaso.

1. Financoj: La spezokontoj de 1993 ne jam estas definitiva. RR kaj PP kontrolas ilin kaj venas al la sama konkludo kiel pasintfoje. Sendube la jaro 1993 kaŭzis deficiton. Pro tio ke en 1992 oni kreis rezervon, oni tamen grandparte povos forigi ĝin.

RR petas, ke la Centro tamen produktu skribajn informojn pri la buĝetitaj subvencioj al la grupoj kaj pri jam deprenitaj sumoj. Se ekzistus iuj juraj aŭ aliaj obstakloj, la punkto revenu sur la tagordon.

Pluraj instancoj de kiuj FEL dependas (ministrejo pri kulturo, AVI-instanco, impostoj, provinco) petas aliforman spezokonton. Tio nun postulas de la Centro tre multan tempon. AH provos trovi volontulon kiu povas verki programon kiu mem kompilas la diversajn spezokontojn surbaze de la ciferoj kiujn liveras la centra komputilo.

2. Administrado: En la membriĝilo jam de jaroj troviĝas kelkaj punktoj sub la listo de aboneblaj revuoj, kie la membro povas mem indiki revuo(j)n kiu(j)n li ŝatus aboni, sed kiu(j) ne troviĝas en la listo. Montriĝas ke ofte tie oni indikas "ekzotan" revuon malpli konatan. Trovi la kotizon, adreson, ktp. de tiu revuo ne ĉiam estas facila. RR proponas, ke ekde 1995
ni indiku, ke FEL pretas peri ankaŭ por tiaj revuoj, sed ke la abononto mem donu kiel eble plej multajn detalojn, i.a. kie li aŭdis pri la revuo, ĉu li jam antaŭe estis abonanto, ktp.

3. SIA: En la 19a de februaro okazos en Leuven la tago de internacia amikeco. Sur la tagordo estas kunveno pri la estonto de la Esperanto-movado en Flandrio. RR preparis labordokumenton kiu nun estas priparolata. La estraro esprimas sian kontenton kaj laŭdon pri ĝi. La dokumento estu disvastigita antaŭ tiu tago al ĉiuj partoprenontoj kaj al la kutimaj
ricevantoj de "Vertikale".

4. MONATO: Estis dissenditaj 2000 provnumeroj fine de 1993. El tiuj 2000 alskribitoj, ĝis nun 88 mendis abonon (4,4 %). Inter tiuj 88 ĉirkaŭ la duono mendis konstantan abonon. Por januaro-februaro 1994 estas planita nova simila kampanjo.

## Adresaro

Wolfgang Bienen, Eynattener Straße 56, D-52064 Aachen
Henny De Ketelaere, Miroeusstraat 26, 2018 Antwerpen
Marcel Delforge, rue des Glacières 16, 6001 Charleroi
Danielle Demeyere, Winterland 23, 8501 Heule, (056) 35 55 35
Wim De Smet, Hertendreef 14, 2920 Kalmthout (03) 666 99 49
Mari-Roza De Wolf, Botermelkstraat 100, 9300 Aalst
Piet Glorieux, Werkerstraat 56, 8610 Werken, (051) 56 90 30
Alex Humet, van Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem, (03) 239 21 69, telekopiilo (02) 217 56 60
Lydia Kerremans, Fabiolapark 6, 2870 Puurs
Germain Pirlot, Steenbakkersstraat 21, 8400 Oostende
Pola Radio, Esperanto-Redakcio, PL 00-950 Varsovio, P.O.Box 46
Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge (050) 33 00 04 (telekopiilo post la 10a sonoro)
Jacques Schram, Hof ter Bekestraat 49, 2018 Antwerpen, (03) 237 86 02
Edward Symoens, Putsesteenweg 151, 2920 Kalmthout
Jos Vandebergh, Ambachtstraat 39, 3520 Houthalen (011) 52 19 43
Raymond Wylleman, A. Vermeylenstraat 65, 8400 Oostende